Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

N-ro 3 * Julio 2019



# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editado en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.*

**ENHAVO** Paĝo


| | |
|---|---|
| Steloj kaj Landoj en la flago de Eŭropa Unio | 3 |
| Flagoj sur la Luno | 7 |
| Esperanto kaj Maraj Signal-Flagoj | 10 |
| Nova Flago de Martiniko | 12 |
| Flago por la Vegana Movado | 13 |
| Historio de la Meksikaj Standardoj | 14 |
| La Fotografaĵo de niaj Legantoj | 19 |
| La Flago de Skotlando kaj la Standardo de Douglas | 20 |
| Vortoj pri Flagoscienco | 23 |
| La Angulo de la Blazonoj | 25 |
| Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O. | 26 |


*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# STELOJ kaj LANDOJ en la flago de Eŭropa Unio

Lastatempe aperas ofte sur ĵurnaloj kaj TTT-paĝoj bildo, montranta la bluan kaj flavan eŭropan flagon kun unu el la steloj detruita aŭ tute forigita. Alegorie, oni montras, pere de ĉi tiu desegnaĵo, la eblan britan foriron en Eŭropa Unio, tio estas, la tiel nomata *briteliro*. Do, oni povus pensi, ke la steloj reprezentas la ŝtatojn de EU kaj se fine briteliro okazas, unu el tiuj steloj devus simple malaperi. Tamen, ni scias, ke sur la Eŭrop-Unia flago videblas 12 steloj, sed nuntempe estas 28 ŝtatoj tiuj kiuj aliĝis al EU. Tiel, ni povus demandi, kion signifas reale la steloj en la flago de la Eŭropa Unio?



Surmura pentraĵo de la artisto Banksy en Dovero (Britio) – Februaro 2019

Ni iru unualoke al la oficiala klarigo de la Eŭropa Unio rilate la flagon, tiel sur la TTT-paĝo de ĉi tiu eŭropa institucio oni povas legi jenon rilate la flagon:

> *"La eŭropa standardo estas la simbolo kaj de la Eŭropa Unio kaj pli vaste de la identeco kaj unueco de la eŭropa kontinento. Sur la blua fono aperas cirklo-forme 12 flavaj steloj. La steloj reprezentas la idealojn de unueco, solidareco kaj harmonio inter la popoloj de Eŭropo.*

La oficiala klarigo eĉ aldonas jenon:

> *"La nombro de la steloj tute ne rilatas al la nombro de la ŝtatoj de la Eŭropa Unio, kvankam la cirklo ja estas simbolo de ties unueco."*

Do, laŭ ĉi tiu oficiala klarigo steloj ne rilatas al ŝtatoj, tamen oni devas aserti, ke oficialeco en tiu klarigo ne egalas al vereco. Ni pristudu, kiam aperis steloj sur la flagoj de eŭropaj institucioj el la historia vidpunkto.

La du unuaj eŭropaj institucioj fondiĝis inter la jaroj 1949 (Konsilio de Eŭropo) kaj 1951 (Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo). Tiu unua, la Konsilio de Eŭropo, estas tipa internacia organizaĵo kie aniĝis preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, kun la celo faciligi la konsciiĝon pri eŭropa identeco surbaze de komunaj valoroj, tiuj ĉefaj: la defendo de la homaj rajtoj kaj la parlamenta demokratio. Do, ĝi verdire estis politika internacia institucio. Alie, la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo reale estis ekonomia internacia organizaĵo, kies celo estis unuigi la produktadon de karbo kaj ŝtalo de, unuamomente, ses eŭropaj ŝtatoj.

La standardoj de ambaŭ organizaĵoj enhavis komunan elementon: la flavaj steloj.

Sur la flago de la Konsilio de Eŭropo, tute simila al tiu de la nuntempa Eŭropa Unio, aperis 12 flavaj steloj. Ĉu ĉi tiu nombro egalas al tiu de la ŝtatoj apartenantaj al Konsilio? Tute ne, kiam oni oficialigis en 1955 la flagon, tiam aniĝis al Konsilio de Eŭropo 14 ŝtatoj, ne 12 (la nombro de la steloj).



Unua flago de la Konsilio de Eŭropo, elpensita de Arsène HEITZ, oficialigita en la jaro 1955.

Laŭ sciigo de la aŭtoro de la flago, Arsène HEITZ, la nombro 12 estas la tradicia simbolo de la perfekteco, de la entuto kaj la unueco.

La aŭtoro ankaŭ informis, poste, pri la katolika origino de la standardo, ĉar la steloj estas similaj al tiuj aperantaj sur la bildo de la Senmakula Koncipiĝo de la Virgulino Maria.



Flago de la Eŭropa Komunumo de la Karbo kaj Ŝtalo (EKKŜ) de la jaro 1951 ĝis 1973.



Flago de la jaro 1973 ĝis 1981.



De la jaro 1981 ĝis 1986.



De la jaro 1986.

Kaj pri la flago de la Eŭropa Komunumo de la Karbo kaj Ŝtalo (EKKŜ)? Videblas sur ĝi steloj, unuamomente flavaj kaj post 1973 okaze de la aliĝo de novaj ŝtatoj la steloj fariĝis blank-koloraj. La nigra koloro reprezentas karbon kaj tiu blua, ŝtalon.

La komparo steloj=ŝtatoj evidentas, pro la fakto, ke post ĉiu nova aliĝo de ŝtato la standardo ricevis unu plian stelon. Tiel, la unua standardo de EKKŜ montris 6 stelojn: Germanio, Italio, Francio, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio. En la jaro 1973, okaze de la aliĝo de Britio, Irlando kaj Danio, la standardo ricevis 3 novajn stelojn.

En 1981 okaze de la aliĝo de Grekio nova stelo aldoniĝis al la flago kaj fine, en la jaro 1986, koincide al la eniro de Portugalio kaj Hispanio, la standardo enhavis 12 stelojn.

En la jaro 1985 ŝtatoj apartenantaj al Eŭropaj Komunumoj, inter ili ankaŭ la EKKŜ, decidis adopti oficialan standardon. Kvankam la laŭ-leĝa

eniro de Portugalio kaj Hispanio en la Eŭropajn komunumojn efektiviĝis la 1-an de januaro 1986-a, jam en junio 1985 oni subskribis en Lisbono kaj Madrido akordojn inter tiuj ŝtatoj kaj la Eŭropaj Komunumoj celantaj la aliĝon de ambaŭ ŝtatoj, do, oni povus diri, ke en la jaro 1985, 12 ŝtatoj estis membroj de la Eŭropaj Komunumoj, poste nomita Eŭropa Unio.

Do, en la momento kiam okazis la oficialigo de la nova flago de la Eŭropaj Komunumoj apartenis al tiuj organizaĵoj 12 ŝtatoj kaj sendube jen la kialo de la ekzisto de 12 steloj sur tiu standardo. En tiu momento oni deklaris ankaŭ, ke okaze de eblaj postaj aliĝoj de pliaj ŝtatoj en la Eŭropaj Komunumoj, la steloj sur la flago ne ŝanĝiĝus. Tiel, malgraŭ la fakto ke pliaj novaj ŝtatoj eniris en la nuntempe nomita Eŭropa Unio, tiuj steloj estis senŝanĝe 12.

Verdire, oni povus diskuti ĉu la flago de Eŭropa Unio estis nova aŭ ne, pro la fakto, ke oni decidis adopti standardon jam ekzistanta, tiu de la Konsilio de Eŭropo. Tamen oni ne povas admisii, ke la originoj de ambaŭ flagoj, se paroli pri nombro de steloj, estas identaj. Tiel, la 12 steloj de la flago de la Konsilio de Eŭropo mencias la perfektecon kaj harmonion de la nombro 12 rilate la eŭropajn popolojn, tamen la 12 steloj de la flago de la Eŭropa Unio reprezentas la ŝtatojn membrojn de la Eŭropa Komunumo en la jaro 1985, kiam la standardo oficialiĝis. Kaj ĉi ĉio spite al la oficialaj sciigoj de la Eŭropa Unio, kiuj ankoraŭ asertas, ke tiuj 12 steloj reprezentas neniun ŝtaton.

Notu la novan adreson de nia revuo:

cordoba@esperanto.ac


# Flagoj sur la Luno



La usona astronaŭto *Buzz Aldrin* respekteme stariĝas antaŭ la flago la 21-an de julio 1969.

Ĉi-jare, kiam oni memoras la 50-an datrevenon de la alveno de la homo en la lunon, ni devas elstari la plej memoratan momenton dum tiu okazintaĵo, tio estas la starigo de flago sur nia satelito fare de usonaj astronaŭtoj. Unuamomente, kiam oni planis detale la vojaĝon, oni diskutis pri kiu flago devus flirti sur la luno. Kelkaj monatoj antaŭe la usona Prezidanto R. Nixon deklaris, ke la spaca esplorado estis "*aventuro de la tuta homaro*",do oni pripensis tiam la eblon starigi flagon reprezentanta la tutan homaron, tio estas, la flago de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, post debato de la Komitato de Simbolaj Agadoj, speciala grupo kreita de la usona spaca agenco NASA, oni decidis, ke devus esti la usona flago tiu starigota sur nia satelito, pro la fakto, ke temis pri projekto pagita de ĉi tiu ŝtato. Tiu akto povus esti komprenata kiel kontraŭa al la Internacia Traktato pri la Ekstera Spaco, subskribita en la jaro 1967, ties artikolaro malebligas la alpropiĝon de satelitoj aŭ planedoj fare de kelka ŝtato. Por eviti ĉi tiun miskomprenon tuj apud la flago sur la luno, oni fiksis tabulon kun la jena teksto:

*"Ni venis kun pacaj intencoj je la nomo de la tuta homaro".*



Specialan stangon oni konstruis por starigi la standardon sur la luno.

La unua solvenda problemo de la respondeculoj de la Komitato de Simbolaj Agadoj de NASA estis kiamaniere starigi videblan flagon, tio estas flirtanta, ene de loko sen atmosfero, do sen vento. Cele al tio, oni konstruis specialan stangon kun du ĉefaj elementoj. La unua estis tipa flanka masto kaj la alia temis pri masto kiu troviĝis en la supra parto. La usona standardo devus esti fiksita sur ambaŭ stangoj, tiel oni povus atingi vidi flagon konstante flirtanta sur la luno.

Ĉi tiu flirtado de la standardo, ĉe loko kie ne ekzistas vento, estas unu el argumentoj diskonigitaj de la *konspiraj teoriuloj* por refuti la ideon, ke la astronaŭtoj sukcese atingis nian sateliton. Laŭ deklaro de la unuaj astronaŭtoj la flanka masto misfunkciis kaj iomete kliniĝis, tio provokis la aperon de ĉifoj sur la flago kaj jen la impreso, ke la standardo reale flirtas, tio estas tute ne-ebla ene de sen-atmosfera loko.

Ĉu estas eble vidi ankoraŭ tiun unuan flagon sur la luno? Ne, jen tio kio okazis. La astronaŭtoj ne sufiĉe profunde enbatis tiun flagon kaj tiel, post la ekflugo de la lun-modulo revene en la Teron, la gasoj elĵetitaj faligis la flagon.

Post tiu unua flago sur la luno, en la jaro 1969, aliaj 6 pliaj alvenis en nian sateliton, unu po ĉiu misio de la projekto *Apolo*. Eĉ ne la plej potenca teleskopo kapablas vidi objekton malpli grandan ol 2 metroj sur la luno. Do, reale, neniu el tiuj flagoj estas videblaj el nia planedo. Tamen, la navo LRO lanĉita en la jaro 2009 por priesplori la surfacon de nia satelito, kapablis registri tute klare la standardojn starigitajn de la *Apolo 12*, *16* kaj *17*.

Laŭ la bildoj havigitaj de tiu esploranta navo, la koloroj de la flagoj estas tute palaj pro la intensa ultraviola radiado ricevata en la luna surfaco.




Astronaŭto antaŭ la usona flago en la jaro 1971, dum la vojaĝo de la *Apolo 15*. Videblas ankaŭ la lun-modulo kaj speciala luna ĉiaterena vehiklo.

VENTO estas la sola revuo en esperanto kiu pritraktas flagosciencajn aferojn.
Kunlaboru kun ni !


# Esperanto kaj la maraj signal-flagoj

En antaŭaj jarcentoj, kiam ne ekzistis radia komunikado inter ŝipoj en la maro, la sola ebleco starigi komunikadon estis la uzo de divers-koloraj flagoj, ĉu pendumitaj en la masto, ĉu uzataj de signal-flagetoj reprezentantaj la literojn. Nuntempe, kiam la uzado de radio-aparatoj ĉe ŝipoj estas tute deviga en ĉiuj maroj kaj oceanoj, la uzo de tiuj signal-flagoj ŝajnas esti ne-utila, tamen nuntempe ĉiuj ŝipoj, militaj kaj civilaj, uzas ilin, por vida longdistanca interkompreniĝado.


La nuntempajn signalflagojn oni difinis en la jaro 1931 de la Internacia Mara Organizo. Ili konsistas el 40 flagoj, el kiuj 26 reprezentas literojn, 10 numeralojn, 1 flago estas konfirmiga kaj 3 ripetigaj. Krome, la literaj flagoj, flirtantaj sole aŭ kunigitaj, havas specifajn signifojn. Tiel la flago reprezentanta la literon C sciigas *"jes";* la litero V: "*mi petas vian helpon*"; la literoj CP: *"mi helpos vin"*¸ ktp.



Litero L
*Haltigu vian ŝipon*



Litero A
*Sukakvisto troviĝas tuj apude*



Litero W
*Mi bezonas kuraciston*




Litero J
*Oni transportas danĝerajn varojn kaj okazis bruligo. Ne alproksimiĝu.*

Kiel dirite, ekzistas 26 flagoj reprezentantaj la literojn, tamen tiuj literoj apartenas al la angla-lingva alfabeto, do, oni ne povas uzi vortojn kun literoj kiel Ñ, Ç, Å, Ð, Þ kaj multaj aliaj. Kompreneble, ankaŭ ne la esperantaj literoj Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ kaj Ŭ, tio estas la supersignitaj literoj de nia internacia lingvo.

Tamen, ĉu vere ne estus eble montri esperantlingvan mesaĝon pere de signal-flagoj sur ŝipo? Jes! Oni ne scias kiam aperis jena propono, sed ĝi estas tute akceptita de tiuj esperantistoj kiuj fakis pri maristaj aferoj. Temas pri la anstataŭigo de la blanka aŭ flava parto de flago reprezentanta literon sen ĉapelo, pere de la verda koloro. Tiel, oni montras la ĉapeligitan literon.

Ni vidu:

Oficialaj Flagoj — Proponataj Flagoj en Esperanto



# Lastaj informoj pri standardoj

## Nova flago de Martiniko

La registaro de Martiniko, franca insulo en la Kariba Maro, proponis pasint-jare publikan konkuron por elekti novan flagon. Ĝis tiam oni uzis flagon kreitan en la jaro 1766, sed neniam tute oficiala. Tiu standardo montris tipan serpenton de tiu insulo. Tamen, el la historia vid-punkto tiu flago estis uzita de sklavo-ŝipoj dum la 18-a jarcento.

La nova flago aperigas konkon (*strombus*), uzata de la indiĝenoj de la insulo, kaj de la tuta Kariba Maro, kiel komunikilo . Ĉirkaŭ ĝi troviĝas 34 steloj, reprezentantaj la 34 urbojn de la insulo. Krome, la flago dividiĝas laŭ 8 okonoj, kiuj simbolas tiujn 8 lingvojn parolatajn en Martiniko dum ties historio. La ĉefaj koloroj de la flago estas la blua, tio estas la maro, kaj la verda, memoriganta la abundajn kaj riĉajn vegetaĵojn de la insulo.



# Flago por la vegana movado

En la jaro 2017 elpensiĝis la flago de la vegana movado, kreita de Gad. V. HAKIMI. Ĝi estas nomata la trikolora V-flago. Laŭ ties aŭtoro, la mesaĝo proponata de ĉi tiu standardo estas la ideo, ke homoj kaj bestoj estas tute similaj, samtempe, ĝi estas am-deklaro al la tero kaj ties plibonigo kaj purigado sub ĉiaj vid-punktoj.

Jen la klarigo de la simboloj uzataj laŭ la aŭtoro:

- La blanka koloro reprezentas la lumon, la bonecon, la sukceson kaj la ekigon de ĉi tiuj ideoj.
- La verda estas la koloro de la vivo, de la Naturo, de la energio kaj la Harmonio.
- Tiu blua parto reprezentas la ĉielon kaj la maron, la fidon kaj la verecon.
- Meze troviĝas blank-kolora litero V.



# Historio de la Meksikaj Standardoj

Post deko da jaroj en lukto kontraŭ Hispanio, Meksikio fine sendependiĝis en la jaro 1821. La tiama "Nova Hispanio" fariĝis la "Meksika Imperio", kelkjara katolika regnolando kiu fine fariĝis federala respubliko en la jaro 1823. Agustín de Iturbide proponis tri kolorojn por la flago de la nova ŝtato, tiam imperio, tio estis, la koloroj verda, blanka kaj ruĝa kaj meze de ili troviĝus aglo. La nova standardo oficialiĝis la 2an de novembro 1821 kaj ĝi daŭriĝis ĝis la fino de la meksika imperio en la jaro 1823. En la komenco la signifo de tiuj koloroj estis jenaj:

- Verda koloro: la sendependiĝo.
- Blanka koloro: la katolika fido.
- Ruĝa koloro: la unuiĝo inter Ameriko kaj Eŭropo.



Flago de la Meksika Imperio 1821-1823

Kiel dirite meze troviĝis aglo, sed ĝi estis tute malsimila al tiu aperanta nuntempe.

Tiuj koloroj jam estis uzataj en la armeo de la “Tri garantioj”, kiu sukcese luktis kontraŭ Hispanio sub la gvidado de Iturbide, la signifoj de la koloroj aperantaj sur la standardo de tiu armeo, bazo de la meksika flago, estis tute similaj al tiu poste oficialigita de la Meksika Imperio.



Standardo de la Armeo de la Tri Garantioj kiu sukcese luktis favore al la sendependiĝo de Meksikio. Ĝi estas la bazo de la meksika flago.

En la jaro 1823 la Imperio malaperis kaj naskiĝis federala respubliko, tiam la aglo perdis sian kronon kaj aperis sub ĝi krono farita el oliv-arbo kaj laŭro kiu hodiaŭ ankoraŭ troviĝas sur la nacia flago.



Post la malapero de la Meksika Imperio
la aglo perdis sian antaŭan kronon

Rilate la blazonon, la simbolo de la aglo kaptanta serpenton apartenas al la Naŭatla kulturo kaj ĝi rilatas al la fondiĝo de la urbo Tenoĉitlano.

Laŭ azteka legendo, la meŝikaj indiĝenoj migris el Aztlano, ĝis loko kie ili trovis aglon vorantan serpenton sur nopalo. Temis pri la reenkarniĝon de la dio *Huitzilopochtili*, ĝi montris la plej taŭgan lokon por fondi imponan urbon.

La unua standardo kie aperis ĉi tiu sceno estis la tiel nomata: *Flago de Morelos*, kreita de la ĝeneralo José María Morelos y Pavón (1765-1815).




Standardo de Morelos. En la latina lingvo aperas jena teksto:
*Oculis et ungibus æque victrix* (Per okuloj kaj ungoj same triumfa).

En la jaro 1861, post tri-jara milito inter konservativuloj kaj liberuloj, kiu kaŭzis la elĉerpiĝon de la nacia riĉeco, la meksika registaro decidis prokrastigi la pagon de la internaciaj ŝuldoj. Britio, Francio kaj Hispanio, ĉefaj kreditoroj, decidis milite interveni en Meksikion kaj do, en la jaro 1862 trupoj de tiuj tri ŝtatoj elŝipiĝis en la Haveno Veracruz. Post konversacioj kun la meksika registaro Hispanio kaj Britio decidis revenigi siajn trupojn, tamen ne agis same Francio, kies ĉefa celo estis krei regnolandon en Meksikion sub ĝia protekto kaj helpi poste la usonajn konfederacianojn luktantaj en la civila usona milito.

Naskiĝis tiam la dua meksika imperio, kies imperiestro estis la aŭstria Maksimiliano de Habsburgo, al kiu la meksikaj politikistoj oferis la estron de tiu nova regnolando.






Standardo kaj blazono de la 2-a Meksika Imperio (1864-1867)

Oni uzis oficiale novan flagon, simila al tiu antaŭe uzata laŭ la formo kaj koloroj, tamen la blazono estis malsimila. Ĉirkaŭ la tradicia aglo kaj serpento, imperia krono lokiĝis sur la blazono kaj flanke du grifoj, mitologiaj bestoj duone leono kaj aglo. La mortpafo de Maksimiliano de Habsburgo metis finan punkton al tiu dua meksika imperio kaj la antaŭan flagon oni ekuzis denove.

En la jaro 1916, dum la estro de Venustiano Carranza, la blazono ŝanĝiĝis.



Oni ekuzis tiam la bildon de la aglo kaj la serpento laŭ la originalaj kodeksoj de la naŭatla kulturo, tio estas rigardata profile kaj haltigita sub nopalo, meksika kakto-arbo.



En la jaro 1934 la blazono iomete ŝanĝiĝis

En la jaro 1968, okaze de la Olimpikaj Ludoj okazantaj en Meksik-urbo pliaj detaloj aldoniĝis al la blazono, sed esence la flago restis tute simila. Nur ŝanĝis la signifo de la koloroj uzataj en la flago, kiu nuntempe montras jenajn ideojn:

- Verda koloro: espero.
- Blanka koloro: Unuiĝo.
- Ruĝa koloro: la sango verŝita el la herooj dum la sendependiĝo.





Impona meksika flago en la Placo *Zocalo*. Urbo Meksiko

## La fotografaĵo de niaj legantoj



Ne oftas la ebloj vidi la andoran flagon ekster tiu malgranda kunprinclando meze de la Pirenea Montaro. Jen la standardo de Andoro ĉe ties ambasadejo en Madrido (Hispanio).

Fotis: *José María Rodríguez Hernández*. Majo 2019.

# La Flago de Skotlando kaj la Standardo de Douglas


**Flago de Skotlando.-**

La kialon de la koloroj kaj de la formo de la flago eksplikas legendo. Laŭ ĝi, Angus la 2-a, reĝo de la piktoj, dum sia lukto kontraŭ la angla armeo, aperis antaŭ li Sankta Andreo kaj al li venkon promesis. Post la rekomenciĝo de la batalo, aperis en la blua ĉielo grandega blanka kruco de nuboj, kaj tuj poste okazis la venko de la piktoj, tiel atingis Skotlando sian sendependiĝon kiel reĝlandon.



Pro tio, la skota flago estas tiel farita. Ankaŭ estas rimarkinda la fakto, ke tia kruco nomiĝas *"Kruco de Sankta Andreo";* ĝi estas uzata en multaj flagoj, kiel la standardo de Nova Skotlando, i.a.

Ĉi tiu versio ankaŭ estis kaj kelkfoje estas uzata, malgraŭ tio, ke uzi ĝin estas teĥnike kontraŭleĝa se vi estas en la skota reĝolando, laŭ antikva leĝo el la 17-a jarcento.



Oni vidas ĉi tiun standardon dum sportaj eventoj, tamen ĝia ĉefa uzado estas en la reĝa kortego.

***Ĉu hela aŭ malhela blua?***

Ekde la kreado de la origina flago, la registaro uzis ambaŭ, nur ŝanĝis pro maldisponebleco de la tinkturo. Ĉiaokaze, la origina estas hela, tamen la nuna estas malhela. Tre simila kaj malhel-blua flago estas tiu de Tenerifo, en la Kanaria Insularo en Hispanio, sed la origino estas tre malsama: la "oficiala origino" de la standardo de Tenerifo klarigas, ke la flago nur estas tiu de la mara provinco, kaj en la internacia mara flaga alfabeto ĝi simple signifas "M". Sed ekzistas ankaŭ legendo, kiu rakontas, ke la registaro tiama apartenis al la Granda Skota Masona Loĝio, kaj por omaĝi la skotan flagon, ili akceptis ĝin. Alia legendo asertas, ke la flago estis akceptita por prifesti la bravecon de la skotaj soldatoj dum la batalo de Sankta Kruco de Tenerifo en la jaro 1797.






Ĉu la blua koloro de la skota flago devas esti malhela aŭ hela ?

Flago de Tenerifo

**Standardo de la kavaliro Douglas.-**

Sir James Douglas estis kavaliro, kiu kuraĝe batalis kontraŭ la maŭroj. La 25-an de aŭgusto de la jaro 1330, la koro de la kavaliro Sir James Douglas ĉesis bati pro la atako de la nazarianoj. Laŭ la legendo, antaŭ la forpaso, li ekkris: *"Antaŭen, kuraĝa koro* -Brave Heart-, *kien vi iras, vi venkos, kaj Douglas sekvos vin aŭ li mortos survoje!"* La menciita kavaliro havis jenan blazonon:





Tamen, post la legenda morto de Douglas, oni aldonis al la blazono koron kaj kronon, ĉar kiam li mortis, li kunportis la enbalzamigitan koron de la reĝo Roberto Bruso, pendita de lia kolo en malgranda skatolo el arĝento.




La morto de la skota kavaliro Sir James Douglas en la sud-hispana vilaĝo Teba, dum lukto kontraŭ la maŭroj kiam li pilgrimis al Jerusalemo por lasi tien la koron de la ĵus forpasinta koro de la skota reĝo, ĉiujare estas memorata en Teba, temas pri la *Douglas' Days* (Douglas-tagoj).

Alejandro Burgos Escalante kaj Juan Diaz Casado

# Vortoj pri Flagoscienco


Por ampleksigi la vortprovizon de ĉiuj legantoj, mi verkos ilustritan artikolon, kiu aperos en ĉiuj numeroj (aŭ almenaŭ tion mi ja celas). Jen la unuaj kvin vortoj:

**FLAGO:** peco de stamino, de kiu unu flanko estas fiskita al ŝnuro, kaj kiun oni povas hisi kaj malhisi; nacia flago (kun la naciaj koloroj, kutime hisata ĉe la posta stango aŭ masto).



*Flago de la esperanto-movado*

**HISI** [tr.]: suprentiri per ŝnuro. Ekzemple: hisi kaj malhisi flagon.




**BLAZONO:** tuto de la insignoj, devizoj kaj ornamoj, kiuj konsistigas la simbolan kaj distingan signon de homo, familio, korporacio, urbo, regno.




*Blazono de Castro Urdiales (Hispanio)*

**VEKSILOLOGIO / FLAGOSCIENCO:** help-scienco de historioscienco, okupiĝanta pri flagoj, standardoj kaj similaj insignoj. La vorto *veksilologio* venas el latina vorto *vexillum / ŭeksillum* (flago, standardo); kaj la finaĵo -logio venas el la antikva greka – λογία / logia (studado).



*Internacia simbolo akceptita de la veksilologiaj asocioj*

**SIGNALFLAGO:** Ĉiu flago de la Internacia Signalaro, per kiu oni povas literumi optikajn mesaĝojn. Signalflagoj estis en antaŭaj tempoj la maniero por komuniki iner la ŝipoj, ĉi tiu komunikado estas uzata sed tamen grandparte forpelita de pli modernaj komunikiloj, speciale de la radiokomunikado.



Signalflago uzata por sciigi:
*"Mi transportas danĝerajn materiojn"*

Alejandro Burgos Escalante

*NOTO: difinoj estas el vortaro.net kaj bildoj estas el Vikipedio.*

# La Angulo de la Blazonoj




Ne oftas blazonoj sur la flagoj de la afrikaj ŝtatoj, malgraŭ la fakto, ke kelkaj blazonoj en tiu kontinento estas vere belegaj. Unu el la afrikaj landoj kiu ja aperigas sian nacian blazonon meze de sia standardo estas Ekvatora Gvineo.

Ĉi tiu ŝtato troviĝas ĉe la Gvinea Golfo kaj ĝia nacia teritorio konsistas el regiono en la afrika kontinento kaj insularo apud ĝi.

Ekvatora Gvineo estis hispana kolonio ĝis la jaro 1968, la kulturo kaj lingvo hispana klare videblas en la blazono, jen ĝi:

Videblas ceibo, tradicia arbo kiu ankaŭ aperis sur la blazono de la teritorio kiam ĝi estis hispana kolonio. Ceibo estas arbo kiu povas atingi ĝis 70 metrojn alte, tiu aperanta sur la blazono montras sian altecon. Oficiale la arbo reprezentas la pakton subskribitan de la enloĝantoj de la teritorio kaj la hispana metropolo por certigi siatempe la sendependiĝon de Ekvatora Gvineo.

Super la arbo troviĝas ses steloj, ili reprezentas la regionojn de la ŝtato: la kontinenta regiono kaj la insuloj Bjoko, Annobono, Korisko, Granda Elobejo kaj Malgranda Elobejo.

Unu el la plej okulfrapaj faktoj de tiu stelaro estas, ke ili estas 6-pintaj, anstataŭ la pli internacia uzado de 5-pintaj steloj, kial? Nu, kiel dirite Ekvatora Gvineo estis hispana kolonio ĝis la jaro 1968, en la hispana tradicio la steloj uzitaj en blazonoj kaj flagoj estas preskaŭ ĉiam ses-pintaj.


Sub la arbo troviĝas devizo kun la jena teksto:

*Unuidad, Paz y Justicia.* (Unueco, Paco kaj Justeco).


## Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O.




Ni petas vian kunlaboron ! Ni serĉas la verkon *"Heraldiko kaj Veksilologio: Terminaro en Esperanto".* La aŭtoro estas Jaroslav KLEMENT, eldonita de Česke Budějovice, loka grupo de ĈEA, en la jaro 1973. Se vi havas ĉi tiun verkon, eĉ fotokopie, bv. kontakti kun nia revuo.



Notu la novan adreson de nia revuo. Ekde ĉi tiu 3-a numero ĝi estas: cordoba@esperanto.ac La adreso estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La poŝta adreso daŭras esti valida ĉi tiu: Revuo VENTO. Apartado de Correos 3142. E-14080 Córdoba (Hispanio). Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvena, kondiĉojn por aperigo de artikoloj vi povos legi sur la sekvanta paĝo.



Memoru, ke V.E.N.T.O. (Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo) deziras esti la faka asocio de Esperanto-Movado rilatanta al flagoscienco. La aliĝo al la asocio estas tute senpaga. Estontece, se oni atingas sufiĉan nombron da aliĝintoj, ni petos nian eniron en UEA-n kiel fakan asocion. Por aliĝi vi nur devas sendi mesaĝon tiu-sence al nia adreso: cordoba@esperanto.ac




Kiel kunlabori kun **VENTO**:

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti verkitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ili devas aperi ankaŭ ene de standardo por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. Sur tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informoj, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ mal-favorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas neniun kontraŭpagon. Kompreneble la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.


VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO